

Kataluna Esperantisto



**NUMERO 331 (97)
KVINA EPOKO
JULIO-SEPTEMBRO
2004**

Instrua IJK

Observantoj en Eŭropo

Ĉe Indymedia

En la tornistro

Nia proverbaro

Ek al kongreso

*La difficultat
de les llengües*

ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO  KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

KEA estas relative modesta asocio, ĝia membraro ne grandas, pro tio ne facilas ĝia videblo en nia ĉirkaŭanta socio, kaj tio gravas por la iama normaligo de esperanto kaj la esperantismo.

La pasintan 11an de septembro, okaze de la nacia tago, nia asocio sukcesis iĝi videbla antaŭ multenombra publiko. Post diversaj kontaktoj kun Gent de la Terra, sendependa organizo celanta la unuiĝon kaj artikiĝon de la katalunia socio, KEA povis disponi pri 3x3-metra budo kadre de la III Mostra d'Entitats dels Països Catalans, en Barcelono.

Dum la tuta festotago nia asocio informis pri esperanto al publiko, kiu entute nombris pli ol 15 000 homojn kaj 120 organizaĵojn. Kaj ni ne nur informis: ni aŭdigis esperanto-muzikon kaj vendis librojn kaj diversajn esperanto-varojn.

Ĝenerale estis tre bona akceptado de esperanto, kun la kutimaj mirmienoj kaj

surpriziĝoj. Ni renkontis nur du skeptikemulojn. Unu argumentis pri la ebleco, ke iam esperanto povus fariĝi imperiisma lingvo (?). La alia opiniis, ke jam estas tro multaj lingvoj en la mondo kaj esperanto fariĝas aldona peno.

Interesiĝo preskaŭ ĉiam okazis je persona nivelo, neniam oni alparolis nin nome de asocio aŭ organizaĵo cele al kunlaboro aŭ simile (unuflanke tio estas malbona el interesocia vidpunkto sed aliflanke ni jam estas ŝtopitaj de aliaj antaj kaj ontaj projektoj, kiuj postulas nian ŝviton).

En aparta tendo, nia simpatianto Jordi Solé i Camardons subskribis siajn librojn al homoj tion petantaj.

La sperto montriĝis entuziasmiga kaj ripetinda. Nun ni planas renovigi nian budon por la venonta 23a de aprilo, Sankta Georgo, aranĝo kiun KEA jam partoprenis pasintjare kun rimarkinda sukceso. □





**Kontentigas
la rezultoj
sed la strukturo
de la asocio
ne firmiĝas**

Kiel kutime, somerajn numerojn kovras diversaj raportoj el la grandaj jaraj kongresoj. Rimarkindas, ke nia agado ne haltis dum tiu periodo, kaj eblas vidi diversajn fruktojn en tiu ĉi numero. Informado plu restas unu el la plej ĉefaj zorgoj, kiel vi povas legi pri la budo dum la 11a de septembro. Indymedia en esperanto estas la unua eta, sed rimarkinda, rikolto el diversaj semoj. El tiu regula semado, plu evidentiĝas fruktodonaj rezultoj en la gazetaro: iom post iom ni al kutimiĝas al dudeko da informoj aŭ mencioj pri esperanto en niaj amaskomunikiloj dum tri-monata periodo. Ni survojas al niaj kvantaj celoj, sed ankoraŭ necesas bone ŝmiri nian strukturon por certigi ilian regulan atingadon.

Kontentigas ankaŭ la ofteco de la renkontiĝoj: la semajnfino en Sau sekvis la modelon de la antaŭaj en Porta kaj Prada. Krome antaŭ ni staras la jubilea kongreso en Ceret, kies densan enhavon vi povas antaŭfrandi en ĉi tiuj paĝoj.

Bedaŭrinde la strukturo de la asocio ne firmiĝas laŭ la planoj, kaj ni denove seniĝas je salajrata konstanta helpanto: Karles Berga devis rezigni pri sia posteno. Sekve, refoje la agado kuŝos sur la estraro kaj manpleno da aktivuloj, kiuj kvankam kreskantaj ne sufiĉas por realigi niajn ambiciajn planojn.

Tamen aktivado kuŝas ankaŭ sur firmaj ideologiaj bazoj. Christian Pinard eldiras sian opinion, kiu memorigas tiun de Dalmau Vallès en la unua numero de la jaro. Fakte estiĝas interesaj diskutoj kaj opini-stato de tuta grupeto de interesiĝantoj pri informado, kiu aŭguste renkontiĝis en Dorres (Alta Cerdanya) kaj zorgas pri Indymedia. Por aldoni plian perspektivon al la debato, ni juĝis oportuna aperigi ankaŭ artikolon el serio de Giuseppe Castelli aperanta en la revuo *L'Esperanto* de Itala Esperanto-Federacio.

Starigi firmajn bazojn celas ankaŭ la publikigo de la eseo de Abel Montagut pri la malfacileco de la lingvoj. Ĝi analizas la radikojn de la facileco de esperanto, kaj sekve kio povas endanĝerigi ĝin. Temas verŝajne pri la unua teoria aliro al la objekto, ke esperanto ne povas esti plena lingvo, ĉar ĝi estas tro facila (aŭ alivorte: ke ĝi fariĝos tiel malfacila kiel ĉiu alia lingvo, se ĝi universaligo).

La revuo deziras informi kaj aktivigi, sed ankaŭ distri kaj foje eĉ amuzi. Perfekte entenas la esencon de tiuj celoj la kontribuo de Pedro Martín pri la esperanta proverbaro: legu, ridu kaj partoprenu!

Hektor Alos i Font

Ĉi-numere informis aŭ kunlaboris: Karles Berga, Juan Català, Gerard Escuer, Pablo Foche, Ricard Guasch, Xavier Margais, Joan Marimon, Ferran Marin, Pedro Martín, Arnau Massanes, Ramon Perera, Christian Pinard, Francesc Poblet, Òscar Puig, Dario Rodríguez, Santiago Sanz kaj Mateu Vic. La frontpaĝan artikolon verkis Karles Berga.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Ret-Info, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Postkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2004: Individua Abonanta Membro 35 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 75 eŭroj; Individua Dumviva Membro 750 eŭroj; Kolektiva Membro 75 eŭroj; Juna Membro 23 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053

UEA-konto: keae-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Arnau Massanes, Mateu Vic.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Òscar Puig, Luz Vázquez.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Nia agado

Esperanto en la Monda Junulara Festivalo

La Monda Junulara Festivalo kunigis ĉ. 8000 junulojn de la 8a ĝis la 14a de aŭgusto en la kadro de la barcelona Forumo 2004. TEJO estis reprezentita en ĝi per tri aktivuloj, Anna-Laura Wickström, Magnus Lindén kaj Mayrim Sandoval. Krom aranĝi budon, ili tre partoprenige kaj pensige prezentis la problemon de lingva egaleco, tiel ke kreiĝis interesaj debatoj. La tri sesiojn de ilia aranĝo, “Internacia komunikado, la lingvo kiel homa rajto” partoprenis ĉ. 35 homoj.

Aktiva IJK

Ok katalunoj partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Rusio. Inter ili, Lluís Batlle vizitis la pedagogian seminarion “Flugiloj de malfacila vento”, organizita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La kongreso kunigis ĉ. 350 homojn en arbara feriejo kelkcent kilometrojn oriente de Moskvo. La enhavo estis riĉa kaj interesa, sed surprizis la manko de nerusiaj parto-



*Magnus Lindén
kaj Anna-Laura Wickström
en la TEJO-budo*

prenantoj kaj gastoj. La junulara movado en Rusio fartas tre bone, kiel pruvas, ke ĝi sufiĉe fortis por, aldone, organizi du antaŭkongresojn kaj du postkongresojn, kiuj fariĝis perfekta okazo por konatiĝi kun la lando.

Enflugiloj de malfacila vento

Lluís Batlle i Rossell

Ĉi-somere okazis, kadre de 60a IJK, kvartaga kurso de ILEI celinta novajn instruistojn de esperanto. Tiu kurso apartenas al projekto “Flugiloj de malfacila vento”.

En ĝi oni instruis laŭteme. La ĉefaj partoj de tiu instruado estis: gramatiko, metodiko kaj praktika provo. En la komenco de la kurso oni povis elekti, kiujn temojn pritrakti gramatike, kaj estis kvizo pri la jam konitaj metodoj. Voĉdone oni elektis du instruotajn lingverojn: fonetikon kaj akuzativon – eble la plej facilajn temojn el la proponitaj. Unuataĝe, la fama Slavik Ivanov estis instruisto pri fonetiko, atentigante nin pri eraretoj laŭ lingva deveno. La duan tagon ni pritraktis la akuzativon ĉiuflanke, per Pavel Moĵajev, kiu mirinde regas plene la esperantan gramatikon. Por tiu antaŭelektita gramatikaĵo estis eĉ presitaj ekzercoj, por ke ni praktiku kaj demandu pri

malfacilaĵoj. Triataĝe ni finpritraktis tiun temon, kaj instruistino Svetlana Smetanina, kun kunlaboro de Irina Gonĉarova, enkondukis nin al metodiko. Ni lernis malsimilajn elprovitajn instrumentojn, aŭ kiel krei nian propran. Lastataĝe, ekzerce, ni planis kaj provis unuan lecionon. Kunlernantoj kaj instruistoj estis lernantoj kaj juĝistoj.

La etoso en tiu kurso estis ĉiam gaja, amuza kaj bonkora, kaj danke al tio la prelegoj enuigis neniun. Male, pridiskuto dum instruado estis vigla kaj tial oni lernis eĉ pli ol estis planite. En venontaj esperantaj aranĝoj oni okazigos pliajn kursojn kiel tiun ĉi. Fakte, rete jam alvenis sukcesaj rezultoj de aliaj. Ni partoprenis la unuan kurson el la serio. Por aliĝontoj, estas verkita de pluraj homoj vasta lernolibro pri tiuj temoj pritraktitaj, disponebla ĉe la TTT-paĝo de Flugiloj:

www.ilei.info/vikio/Flugiloj_De



Lluís Batlle dum la IJK

Sukcesa UK

Tri katalunoj partoprenis la Universalan Kongreson en Pekino. Aparte elstarindas la reelektado de Josep Franquesa, prezidanto de KEA, kiel C-komitato de UEA. Tiajn komitatanojn elektas la aliaj membroj de la komitato, same la delegitoj de la landaj kaj fakaj asocioj (A-komitatoj) kiel tiuj rekte elektitaj de la individuaj membroj (B-komitatoj). A-komitatoj akaparas 75% de la komitato, dum la B- sumas nur ĉ. 10%, kvankam la individuaj membroj estas la triono de la tuta membraro, kaj la tre ĉefa enspezofonto. C-komitatojn oni principe elektas kiel spertajn konsilantojn, kvankam plej ofte transprenas tiujn postenojn la estraranoj. Josep Franquesa, pli ol 40 jarojn sperta pri komerco per esperanto, estas ĝuste eksperto, kiu povas helpi la komitatajn laborojn en tiu praktika fako.

Observantoj en EEU

KEA estis akceptita kiel observanta asocio en la komitato de Eŭropa Esperanto-Unio dum la 6a Eŭropa Esperanto-Unio en

Bilbao. Prezitis la proponon nia estrarano Llibert Puig. Aliflanke, pro la neeblo certigi la monajn rimedojn por daŭrigi la nunan strukturon de la Brusela Komunikad-Centro, ĝia direktoro, Dafydd ap Fergus, informis, ke li forlasos sian postenon fine de la jaro.

Indymedia en esperanto

La 8an de septembro, la asembleo de Indymedia Barcelono akceptis la enkondukon de esperanto en siajn paĝojn. Indymedia estas tutmonda libera informejo, kiu fulme kreskis en la lastaj jaroj. Ĝi fondiĝis en 2000 pro malkontento pri la informado en la amaskomunikiloj pri la manifestacioj en Seatlo dum la antaŭa jaro kontraŭ la tutmondiĝo kaj la ekstrema ekonomika liberalismo. Ĝi fakte estas neformale ligita al la Monda Socia Forumo kaj ĝia ĉirkaŭa movado. Post kvar jaroj, ekzistas plurcentoj da urboj kun Indymedia en la mondo. Ĉiuj estas tute sendependaj unuj de aliaj, kaj funkcias rimarkinde malsame.

La barcelona Indymedia estis la unua fondita en Eŭropo kaj, kiel aliaj, uzas plurajn lingvojn. Fakte, ĉiu rajtas afiŝi sian novaĵon en kiu ajn lingvo: tiu simple elektu, kiu komprenos ĝin. Tamen, por iom ordigi la naturan kaoson, grupo (tute malferma) de aktivuloj regule kunigas novaĵojn, redaktas resumon kaj ligas ĝian enhavon al la afiŝitaj novaĵoj. Tiujn resumojn oni tradukas al diversaj lingvoj, ekz. al la angla kaj al la hispana en Barcelono, kaj nun al esperanto.

Per tio la barcelona Indymedia fariĝos la dua en la mondo, post la brazila, enkondukanta esperanton.

Renkontiĝo en Sau

Dek tri homoj renkontiĝis en Vilanova de Sau la 18an kaj 19an de septembro. Post mallonga konatiĝo kun la belega ĉirkaŭaĵo, la grupo sidis ĉirkaŭ tablo. Hektor Alos gvidis interŝanĝon de kongresaj spertoj, de kiu ne nur novuloj profitis. Post la vespermanĝo Llibert Puig prezentis tri solidarecajn esperanto-asociojn, Espero, IKEL kaj Monda Solidareco, Neus Moly parolis pri Akademio Internacia de la Sciencoj de San-Marino, kaj fine Ramon Perera prelegetis pri "naskiĝo kaj kresko de la esperanta vortrezoro". Kiel kutime, la

*Dekstre:
La 18an de junio Centro de Esperanto Sabadell organizis la tradician kursofinan vespermanĝon.*



*Sube:
Membroj de IKEL partoprenintaj la Eŭropan Kongreson*



sekva mateno estis malstreĉiga, kaj la grupo promenis tra la arbaro ĝis la digo de Sau sub mirinda pejzaĝo de klifoj blankruĝaj. Post la tagmanĝo, kaj antaŭ la disiro, okazis demandoludo organizita de Karles Berga. Trankvila kaj varia aranĝo tre taŭga por praktiki la lingvon.

Pacmarŝo

De la 9a ĝis la 18a de julio tri kolonoj de kunmarŝantoj direktiĝis al Barcelono el Figueres, Fraga kaj Vinaròs por pledi por nova packulturo. Oni celis eduki pri la packulturo per marŝo kiu, traŭrante vilaĝon post vilaĝo, faciligos aranĝojn, debatojn, koncertojn, prelegojn, ktp; instigi kaj elvoki la personan sindevigon por paca mondo, ellernante kiel solvi konfliktojn pace kaj juste; kaj postuli de partioj, organizaĵoj kaj publikaj institucioj firman sindevigon por la konstruado de paca mondo. Ĝin subtenis tre elstaraj asocioj, kiel Fundació per la Pau, la Plat-formo Ni Haltigu la Militon kaj Kataluna Federacio de NRO por la Homaj Rajtoj. KEA kontribuis per la traduko al esperanto de la manifesto, kiu estas afiŝita en la TTT-ejo de la marŝo ĉe marxapau.pangea.org/

Bunta gazetara rikolto

La granda informo pri esperanto de ĉi tiuj lastaj monatoj estas la kvar-paĝa artikolo de David Bassa en la aŭgusta numero de la populariga revuo pri historio *Sàpiens*. Temas pri facillega kaj bonege ilustrita promonado tra la historio de la kataluna esperanto-movado ĝis la nuntempo. En aparta skatolo, nia samasocio Francesc Poblet verve asertas, ke “esperanto plijustigus la mondon”.

Al Francesc Poblet ni ŝuldas ankaŭ interesegan artikolon pri Jaume Miravittles, ĵurnalisto, komisaro pri propagando de la kataluna registaro dum la civitana milito kaj aktiva esperantisto. Ĝi aperis en la maja numero de *Esquerra Nacional*, kiun en la antaŭa oktobro publikigis lia artikolo pri Frederic Pujulà i Vallès.

Alia elstara prihistoria artikolo aperis en tri paĝoj de *Diari del Baix Penedès* de la 23a de julio fare de Ricard Guasch. Temas pri resumo de lia laboraĵo, kiu meritis intervjuon en la pasinta numero de *Kataluna Esperantisto*.

Ankaŭ la eldono en la kataluna de la retkurso *Lernu!* vekis diversajn reagojn en la gazetaro. La retĵurnalo *Vilaweb* informis pri ĝi la 7an de julio, same kiel la 13an de aŭgusto la semajna gazeto *Presència*, kiu aperigis videblan bildon. Du tagojn poste, ankaŭ *La Malla*, la retĵurnalo de la Magistrataro de Barcelono, informis pri ĝi en sia fako “la TTT-ejo de la tago”. La temo plaĉis al ĝia redakcio, ĉar la 23an de aŭgusto, ĝi informis samrubrike pri la antaŭe aperinta katalunigo de la brazila perkomputila kurso.

Ankaŭ kongresoj interesis la gazetaron. Pri la Internacia Junulara Kongreso raportis la 15an de julio la gazeto *La Comarca* el Garrotxa surbaze de modelo verkita de la Brusela Komunikad-Centro. La unua informo pri la Universala Kongreso aperis la 13an de julio en *Tinet digital*, la renovaĵejo de la regiono de Taragono, kaj okupiĝis ĉefe pri la partopreno de Manel Vinyals en la kongreso. Ankaŭ ĉi tiu artikolo baziĝis sur modelo de la Komunikad-Centro. La 22an la novaĵ-agentejo *Europa Press* dissendis novaĵon pri la kataluna partopreno en la kongreso. En la sekva tago, *Vilaweb* pli amplekse publikigis la novaĵon, emfazante la partoprenon de Vinyals kaj lian pakportalon bazitan sur esperanto, same kiel la artikolo en *Sàpiens*. Kaj en la 24a aperis alia artikolo en la kontraŭ-tutmondisma retejo *Indymedia* el Barcelono. Post la kongreso, la 12an de aŭgusto la elsendo *Ona Catalana* intervjuis dum 20 minutoj Josep Franquesa kaj Manel Vinyals.

Ankaŭ kursfina renkontiĝo en Rià de la grupo el Conflent meritis kvar-kolumnan novaĵon kun foto la 18an de julio en *L'Independant*. Same, *Diari de Tarragona* publikigis duonpaĝan intervjuon kun Luis Serrano, aktivulo de Kultura Asocio Esperantista,





okaze de venont-oktobra ferisemajno en Salou.

El País notis en sia agendo pri la premio Delfi Dalmau la 27an de julio. *20 minutos* la 26an majo aperigis novaĵeton pri la TTT-ejo de Hispana Esperanto-Federacio dum samtage *La Vanguardia* menciis esperanton (kaj Interlingua) en satiro.

Apartan mencion meritas la diversaj leganto-leteroj aperintaj en ĵurnalo *El Punt*. La 28an de majo Hèctor Alòs sub la titolo “Anglès i esperanto” replikis antaŭan leteron de leganto, kiu taksis la anglan “iaspeca esperanto”. La 11an de aŭgusto Ramon Torramadé, konata progresema politika aktivulo el Salt kaj ofta kunlaboranto de la ĵurnalo en tiu rubriko, favoris esperanton kiel lingvon de Eŭropa Unio sub la titolo “Català a Europa”. Kaj la 23an, li proponis ĝin kiel mondolingvon en “Una sola llengua mundial”. Du tagojn poste, nia samasocio Eugeni-Lluís Batalla proponis la enkondukon de esperanto en TTT-ejo, substrekante la ĉieson de nia lingvo (“L’esperanto de tothom”) kaj la 9an de septembro li kontraŭis la praktike devigan instruadon de la angla, kiun li taksas imperiisma, kaj pledas por la enkonduko de esperanto en la lernejoj (“La falera per l’anglès”).

kb/jc/ge/rg/xm/fm/am/cp/fp/op/ss/mv/red

Andreu Nin, esperantisto

Aperis la dua volumo de la verko “La guerra civil a Catalunya”. En ĝi aperas biografio de Andreu Nin, fare de nia kunmembro Francesc Poblet, kiu tekstas interalie:

“L’any 1906 va fer un discurs de salutació a la senyera al Centre Catalanista del Vendrell, del que més tard esdevindria secretari. De ben jove ja es va sentir atret pel catalanisme d’esquerres i per l’internacionalisme obrer, i fou un actiu divulgador de l’idioma esperanto, essent un dels fundadors, l’any 1909, de la societat esperantista Frateco (Fraternitat) d’El Vendrell.”

“La guerra civil a Catalunya” meritis i.a. tutpaĝan recenzon en la semajna gazeto *Presència* de la 17a de septembro.

Kurso en Etnosur

Ramon Rius gvidis tre sukcese esperanto-kurson en la multkultura festivalo Etnosur, okazinta en Alcalá la Real (Andaluzio) la 16an, 17an kaj 18an de julio. Temas pri aranĝo ĉefe muzika, sed en kiu estas ĝueblaj ankaŭ alispecaj kulturaj elmontoj: prelegoj, kino, kursoj, budoj ktp. En tiu kadro estis budo de la loka esperanto-grupo kaj de la asocio “SAT en Hispanio”. La kurson ĉeestis inter 30 kaj 40 homoj.

pf/dr/red

La Forumo 2004 en Kontakto

La junulara revuo *Kontakto* publikigis en sia tria numero de la jaro artikolon de Hektor Alos i Font pri la barcelona kulturforumo. La ŝoka titolo “Kultura Disneyland” maskas eble laŭintence ekvilibranta artikolon, sed esence kritikan pri la aranĝo.

Kontakto organiziĝas laŭ temaj numeroj, kaj en tiu okazo ĝi okupiĝas pri diskriminacio. Elstaras artikolo de Joel Amis pri “kion vere diras la Biblio pri samseksemeco”, kie li profunde analizas la

CURSOS D'ESPERANTO

Curs elemental 2004-2005

Amics de la Unesco
C. Mallorca, 207, pral.

Informació i inscripcions:
Ramon Perera i Neus Moly
tel: 93 458 56 99
ramoneus@drac.com

Curs de conversa

Barcelona Esperanto-Kontaktejo
C. Padilla 196, Barcelona

Inici: 4 d’octubre
Horari: Dimarts de 20:00 a 21:30
Preu: 60 euros
Carles Berga:
tel: 93 246 37 36
k.berga@esperanto-ct.org

radikojn de la diferencoj inter konservativaj kaj progresemaj kristanoj. Ne malpli pensigas la artikolo de Magali von Blotnitz pri “kiel ripari la rezultojn de jardekoj da diskriminacio” en Sud-Afriko. La aŭtorino analizas kelkajn negativajn postsekvojn de pozitiva diskriminacio favore al la negra loĝantaro, kvankam ŝi subtenas ĝin. La internacieco de la revuo, kun kunlaboroj ankaŭ el Irano, Rusio, Brazilo k.a. brile kronas la enhavon.

Esperanto en la tornistro

La esperanta versio de la libro pri la mondvojaĝo de Manel Vinyals kaj Joaquim Marcoval eldoniĝis en Ĉinio tuj antaŭ la Universala Kongreso en Pekino. La libro surprizas per sia kajera formato kaj elementa kompostado. Ankaŭ pro la fuŝlingvaj enkondukaj vortoj. Tamen se la leganto travadas ĉion ĉi, li retrovos la atentokaptajn aventurojn de niaj samlandanoj, interesajn klarigojn kaj pensojn kaj ioma bildo pri la stato de esperanto, kaj simplaj esperantistoj, en la mondo. Por katalunoj, la verkoj havas kroman intereson, ĉar la komparo kun la kataluna eldono estas lingve tre instrua.

Manuel Vinyals, Joaquim Marcoval. *Esperanto en la tornistro, mondvojaĝo en 79 tagoj*. Ĉinesko, 2004. ISBN 988-97267-5-2.

La civitana milito en Bunyola

La pasintan 17an septembro, nia samasocio Xavier Margais prezentis en Bunyola sian historian verkon *Bunyola. Amb la por al cos*. En ĝi li rakontas siajn esplorojn pri pluraj faktoj okazintaj en tiu majorka vilago dum la 2a Respubliko kaj la milito. Rilate la faŝistan ŝtatrenverson la aŭtoro analizas la ĝendarmerion (Civilan Gvardion), la rolojn de la eklezio kaj de la lokaj aŭtoritatoj kaj plej profunde la lokan militan organizon kaj la teruran

subpremadon. Ekzemplo pri ĝi estas la fakto, ke ankoraŭ restas en la tombejo de Bunyola pluraj kadavroj de murditoj de faŝistoj, kies identecon oni ne konas. Eĉ du el la majorkaj esperantistoj murditaj en tiu epoko plu kuŝas en nekonata loko.

La verko apartenas al la kolekto “La Guerra Civil a Mallorca. Poble a Poble”, komuna iniciato de la eldonejo Documenta Balear kaj la universitato de la Balearaj Insuloj, kaj *Bunyola. Amb la por al cos* estas la sepa ero de la kolekto.

Xavier Margais. *Bunyola. Amb la por al cos*. Documenta Balear-Universitat de les Illes Balears, 2004. ISBN 84-96376-02-8. 166 paĝoj.

Parlamentara raporto esperantigata

Nia aktivulo el Prada Christian Pinarid grupigis pli ol 40 diverslandajn esperantistojn por traduki al esperanto la raporton pri la atencoj de la 11a de septembro 2001 publikigita de la usona parlamento. Temas pri detalplena informo, preskaŭ 600-paĝa, kiu rezultis el la parlamentaj esploroj pri la okazaĵoj. Ĝia publikigo en Intereto en julio fariĝis mondvesta novaĵo. Per tiu laboro la teamo de tradukantoj deziras ankoraŭfoje pruvi al la tuta mondo la taŭgecon de nia lingvo. Antaŭvideble, la tasko ne pretos ĝis la komenco de 2005.

Solidareco en Afganio

Nia samasocio Felip Artero pasigis tutan monaton en Afganio kunlaborante en la starigo de akvoduktoj kaj mikro-elektrocentraloj en la orienta regiono Nuristano. La projekton plejparte financas la eŭska registaro. Jam duan fojon li vizitas la landon kaj en antaŭa vojaĝis al kampadejoj de rifuĝantoj en Pakistano. Li aktivis ĉe ni favore al la Revolucia Asocio de Afganaj Virinoj.



Martí Aguado, senlaca aktivulo

Kun bedaŭro ni informas ke la 9an de aŭgusto de 2004, mortis 88-jaraĝa nia estimata kolego Martí Aguado. Li estis membro de KEA kaj aliaj esperanto-grupoj. Sed plej forte li ligiĝis al Ĝirona Espero, kies prezidanto li estis. Kiam estis laboro li kunlaboris sindoneme, en renkontiĝo li partoprenis aktive, dum asembleo plenkore li helpis la estraron. Sen dube li estis la eterna kongresanto de nia loka grupo. Ĝis pasintjare, 87-jaraĝa, li partoprenis en internacia kongreso. Lia afabla vizaĝo, lia nelacigebla sindonemo kaj lia agrabla konversacio estas konataj ĉie, kie li iris, kaj por ni ĉiuj ili estos ne forgesablaj.

Arnau Massanes

Kia Eŭropo, kia mondo bezonas esperanton?

Christian Pinard

*La mondo kiu bezonas
esperanton ne estas
la registara
sed la civitana*

Tiun strangan demandon naskis la legado de laste ricevitaĵoj: francaj esperantistoj denove peticias por enirigi esperanton en la bakalaŭron... hungaraj samideanoj proponas enirigi esperanton en la mezlernejojn... ĉieaj esperantistoj ĝojas pro la elekto de pola esperantistino en la Eŭropa Parlamento... germana firmego trudas siajn dungitojn labori po 40 horoj semajne pagante 35, minacante translokigi la entreprenon al Pollando (post tiu “sukceso”, ili proponas eĉ mallongigi la feritagojn je unu semajno)... hispanaj agrikulturistoj ne plu dungas siajn laboristojn en Maroko sed en mez-eŭropaj landoj, pro malmulta kosto (jam delonge ili ne plu dungas en Hispanio)... la eŭropaj balotoj interesis malpli ol 45% de la eŭropanoj (ĉu pli ol la duono opinias do, ke baloti estas neŭtila agado por ŝanĝi ion?)... la franca firmo Dassault aĉetis egan francan ĵurnalaron (fabrikanto de armoj aĉetante gazet-eldonejon, kian liberecon havos la ĵurnalistoj?)... Mi povus daŭrigi la liston, jam sufiĉas. Io estas putra ankaŭ en Eŭropo, sed tio ne estas novaĵo, opiniis mi kiel civitano. Io estas erara ankaŭ en la movado, kaj tio ĉagrenas min, opiniis mi ĉi-foje kiel esperantisto.

En Francio, la unua propono por enirigi esperanton en la lernejojn okazis en la jaro 1907, sensukcese; ĉe la Ligo de Nacioj tio okazis la jaron 1921, sen pli da sukceso. La pasintan jaron, eŭropaj deputitoj vane proponis esperanton por Eŭropo... Tiom da fiaskoj malĝojigas kaj senesperigas gesamideanojn. Proponante esperanton al la naciaj registaroj, al la oficialaj institucioj, ĉu ni celas la taŭgan publikon? La politikistoj ne bezonas komunan lingvon, ili jam havas armeon da tradukistoj, pagitan per niaj impostoj... La estroj de la firmoj jam havas sian komunan lingvon, tiun de la mono, de la potenco: la anglan lingvon. Kiujn avantaĝojn havus la politikistoj kaj la firmestroj, se ili oficialigus esperanton? Per esperanto, la popoloj parolus per unu voĉo, vera civitana potenco naskiĝus kontraŭ la politika kaj “mona” potencoj; “dividu kaj regu”, jen ĉiama sentenco, kaj inciti la popolojn lerni esperanton estas tute mala celo. Jen kialo de

la malsukceso de la proponoj por oficialigi esperanton: ni proponas ĝin al tiuj, kiuj plej timas la sukceson de la lingvo, al tiuj, kiuj la plej perdus se esperanto sukcesus. La estroj de nia nuna mondo ne plu estas la kreintoj de la Ligo de Nacioj aŭ la Ruĝa Kruco. La nunaj estroj de l' mondo obeas la potencon de la mono, de la firmoj: rigardu, kiu gajnis monon danke al milito en Irako, kaj vi vidos la verajn celojn de tiu moderna epopeo...

Ni flankenlasu, do, la politikistojn. Nenion ili faros por helpi la popolojn aŭ kontraŭi la povon de la firmestroj. Tiuj bezonantaj nian komunan lingvon estas tiuj nur spertantaj la decidojn de la potenculoj. Ili estas disaj, do malfacile atingeblaj. Ankaŭ tie, nenio ŝanĝiĝis ekde la tempo de Zamenhof; sed refoje, “en la mondon venas nova sento”. Civitanoj ariĝas por aŭdigi sian voĉon - almenaŭ en tiuj partoj de l' mondo kie serĉi ion por tagmanĝi ne estas la plej grava okupo (sed agante, tiuj helpas tiujn ĉi). La Monda Socia Forumo, internaciaj asocioj, mondaj grupigoj de civitanoj laŭte diras “alia mondo eblas”. Ili jam konas la problemon de la lingvo por interparoli; sed ili ne havas tradukistojn por solvi tion, kaj ili ofte rifuzas la anglan lingvon pro la ideoj, kiujn ĝi elvokas. Jen nia celpubliko. Humanismo, interkompreniĝo, internaciismo; iliaj ideoj kongruas kun la ideoj de esperanto; ilian lingvan problemon ni povas solvi.

Sed tio postulas radikalan ŝanĝon ĉe niaj movadaj estraroj. Ni ne plu zorgu demandojn por esperanto antaŭ la registaroj aŭ la oficialaj institucioj: aŭ ili ne volas la sukceson de nia lingvo, aŭ ili ne havas potencon por trudi ĝin. Ni lekas de jaroj la piedojn de tiuj potenculoj, por rezulto nula; ni atendas de jaroj en la antaŭĉambroj de la povo, sed la potenculoj rigardas nin kvazaŭ lakeojn. Ni retrovu nian fierecon; ni forlasu neŭtralecon. Ni iru ĉe la neoficialaj, internaciaj asocioj, ni iru ĉe la alimondistoj, ni iru tien, kie oni bezonas kaj atendas komunan lingvon kiu ne estas tiu de l' potenco. Certe, tio estas nek la plej rekta nek la plej taŭga vojo al la oficialaj lunĉoj aŭ la honoraj medaloj. Sed tio estas la vojo por sukcesigi esperanton en nia nuna mondo: ni donu ĝin, al tiuj kiuj bezonas ĝin, ne al tiuj, kiuj ĝin mokas.

La mondo, Eŭropo, kiu bezonas esperanton ne estas la registara sed la civitana. Ni iru ĉe la civitanojn, ne plu ĉe la registarojn!



Niaj proverboj (1)

Pedro Martín Burutxaga

“Ĉiu komprenas la gravecon, kiun havas la proverboj en ĉiu lingvo. En formo de mallongaj, facile memoreblaj frazoj la proverboj enhavas grandan trezoron da popola saĝeco, kaj per mallonga proverbo oni ofte pli bone kaj pli konvinke esprimas ian ideon, ol per multevorta parolado. Konado de proverboj estas necesa por perfekta konado de la lingvo”.

Jen trafaj vortoj de Marko Zamenhof, patro de Ludoviko, en antaŭparolo al “Proverbaro Esperanta”, impona kolekto de 2630 proverboj kaj eldiroj en esperanto pretigita de sia filo surbaze de kvarlingva (rusa-pola-franca-germana) frazeologio-proverbaro antaŭe publikigita de li.

Kompreneble, tiutempe (1909-1910) esperanto ne havis post si tiom da historio kaj praktika uzado por posedi propran popolan proverbaron, tiel Zamenhof devis traduke krei ĝin. Kaj la rezulto vere frapas ĉar li bonege imitis la tradiciajn formojn. Liaj proverboj en tiu nur 20-jara esperanto aspektas plurjarcente maljunaj eldiroj de iaj esperanto-parolantaj prapatroj.

Krom tio, la fakto kiu ankaŭ multe surprizas la leganton estas la simileco inter tiuj zamenhofaj proverboj kaj liaj propraj, ĝis la ekstremo, ke kelkaj el ili ŝajnas rektaj tradukoj el lia lingvo, ekzemple la kataluna. Tio denove pruvas la universalecon de tiu “trezoro da popola saĝeco”.

Jen diversaj ekzemploj kun iliaj katalunaj ekvivalentoj:

– For de l' okuloj, for de la koro (Lluny dels ulls, lluny del cor)

– Plena estas la infero de promesitaj aferoj (De bones intencions, l'infern n'és ple)

– Fiŝo pli granda malgrandan englutas (El peix gros es menja el petit)

– Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ (El que puguis fer avui no ho esperis fer demà)

– En dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu (A casa d'un penjat no hi anomenis cordes)

– Vivi kun iu kiel hundo kun kato (Estar com el gat i el gos)

– Okazo faras ŝteliston (L'ocasió fa el lladre)

– En la trijaŭda semajno (La setmana dels tres dijous)

– La muro havas orelojn (Les parets tenen orelles)

– Grandaj malbonoj – grandaj rimedoj (Als grans mals, grans remeis)

Sed atenta legado de la verko de Zamenhof montras kelkajn mankojn. Ĉar temas ja pri internacia lingvo, li kompreneble ne inkludis naciismajn proverbojn en sian esperantan kolekton; traduko far Zamenhof de proverbo kiel ekzemple “El qui no va a missa el diumenge és moro o jueu o heretge” estas tute neimagebla.

Oni facile komprenas ankaŭ la mankon de proverboj rilate al vetero, tiel abundaj en aliaj lingvoj, ĉar vetero multe dependas de la situo de la koncerna lando; fakte nur du tiaj aperas en la proverbaro, kaj kurioze ambaŭ pri la monato aprilo: “Aprila vetero – trompa aero” (Abril i senyors, tots traïdors) kaj “Pluvo en Aprilo – por la tero utilo” (A l'abril, cada gota val per mil).

Sed sen ia ajn pravigebla kialo ol la konata prudeco de la aŭtoro, mankas ankaŭ aliaj proverboj, ĉefe tiuj kiuj entenas maldec(et)ajn vortojn aŭ sugestojn, ĝuste tiuj kiujn ni katalunoj onidire tiom ŝatas. Do mi petas vian helpon por esperantigi kelkajn el ili kaj tiel plenigi tiun truon en la proverbaro. Ni kompletigu la verkon, kiun Zamenhof ne kuraĝis finpretigi!

Jen mia unua propono; temas pri elpensado de traduko esperanten de la sekvaj tri katalunegaj proverboj:

– Quan hom està de pega, fins amb els collons ensopega.

– Trons de cul, tempesta de merda.

– Allà on hi ha pèl hi ha alegria.

Viajn sugestojn, en klara zamenhofeca stilo, bonvolu sendi al la redakcio. En venonta numero de la revuo ni diskonigos la sugestitajn tradukojn.



*Mankas proverboj
kiuj entenas
maldecajn vortojn*

Interreta rubriko

Dario Rodríguez

La reta libroservo de UEA kreis paĝon kun recenzoj de verkoj el sia katalogo; nuntempe aperas 142:
katalogo.uea.org?st=recenzoj

La plena kolekto de la “Lingvaj Respondoj” de Zamenhof estas legebla ĉe: esperanto.org/Ondo/L-lr.htm

Legeblas rete la kompleta esperanta versio de la sukcesa libro de Ulrich Matthias “Esperanto - La nova Latino de la Eklezio”, originale verkita en la germana kaj tradukita nun al pluraj lingvoj:
home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/latina.htm

Jen retpaĝo kiu listigas multajn esperantajn dissendolistojn:
www.eventoj.hu/snd-list.htm

Du verkoj de Rabindranath Tagore, tradukitaj esperanten far Kalocsay: “La ĝardenisto kaj la reĝino” kaj “La juna princo” legeblas ĉe: www.tekstoj.nl/lm/lm22-2/ghardenisto.html kaj www.tekstoj.nl/lm/lm22-2/princo.html

La Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE) havas propran retpaĝaron, en kiu troveblas teknikaj artikoloj kaj faka terminologio
take-esperanto.org

La fonetika simpleco de esperanto evidentiĝas per la transskribo de ties literoj per la Internacia Fonetika Alfabeto. El niaj 28 literoj, 21 havas la saman signon en ambaŭ alfabetoj, kaj 7 bezonas transskribon per specialaj signoj. Vidu ĉe:
www5d.biglobe.ne.jp/~hel/jp/fonetika_signo.htm

Aperis nova versio 3.03 de la fama brazila reta kurso de esperanto, disponebla en la kataluna kaj pluraj aliaj lingvoj:
www.kurso.com.br

Se oni serĉas esperantan libron jam elĉerpitan, jen utila adreso de brokantejo kie eble vi povos ĝin aĉeti:
home.t-online.de/home/robo.espero/

PREZENTI ESPERANTON

En nia medio laŭ nia sperto

Giuseppe Castelli (el *L'Esperanto*)

Ĉu vi rimarkis, ke kiam politika partio volas varbi inter la anoj de mezlernejo, ĝi ne sendas tien maljunan skabenon pri sporto kaj kulturo, sed ĝi lasas la gvidadon de asembleoj kaj la ceteran agadon al tiuj lernejoj kiuj mem membras en la junularo de tiu partio?

Ĉu vi vidis en porvirinaj gazetoj tiujn reklamojn, kiuj proponas al la legantinoj labori por firmao montrante kaj vendante ŝminkaĵojn aŭ subvestaĵojn al siaj konatinoj?

Ĉu vi scias, ke en multaj centroj por helpi drogulojn laboras eksdroguloj?

Tio okazas ĉar partioj, firmaoj kaj helpcentroj scias, ke mezlernejo volonte aŭskultas alian mezlernejon, dommastrino alian dommastrinon, drogulo eksdrogulon. Ili scias, ke agante en medio kiun oni bone konas, oni pli facile akiras

respekton kaj atenton. Ofte ni, esperantistoj, forgasas tion ĉi, kun antaŭvideblaj rezultoj.

Se ni aranĝas informprelegon ĉe universitato, kaj tie ne prezentas esperanton studentoj aŭ instruisto de tiu universitato, sed homoj el tute alia medio, la efiko estos malbona. Se mi, kiu neniam okupiĝis pri politiko, skribas al politikisto por ke li subtenu nian movadon, verŝajne mi ridindigos min kaj ankaŭ la movadon. Se mia kono de la itala lingvo estas ne pli ol averaĝa, kaj mi neniam trejniĝis pri komunikado, miaj leteroj al gazetoj malbone funkcios.

La risko ridindiĝi aparte grandas en la interreto, se oni tro haste elpaŝas kaj ĝenas aliulojn per sia nesperteco. Sed pli ĝenerale: kiam ni provas varbi inter katolikoj, kontraŭtutmondigemuloj, ĵurnalistoj sen esti

mem katoliko, kontraŭtutmondigemulo, ĵurnalista, ni agas same senrespondece, kiel se ni sendus drogulon vendi ŝminkaĵojn al dommastrinoj, dommastrinon reklami partion inter mezlernejoj, kaj mezlernejanon labori kun droguloj.

Ofte oni kontraŭargumentas: “Se spertuloj farus ion, ekzemple lobius ĉe politikistoj, mi volonte lasus al ili la taskon; sed neniu faras ion, do mi decidis agi mem: estas pli bone ol nenio!”. Sed unue, ja pli bonus fari nenion ol difekti nian bildon agante en “danĝera” medio; due, ne nepre la alternativo estas fari nenion. Ĉiu el ni havas *sian* medion: kolegoj, amikoj, anoj de la sama asocio aŭ eklezio... Inter ili ni povas fidi nin mem kaj komuniki sen troa risko fuŝi. Kiam ni tie trovas interesigon, ni prezentu esperanton tie: estos pli rezulte, kaj verŝajne pli agrable.

La dificultat de les llengües i les funcions lingüístiques

Abel Montagut (Traducció: Josep Virgili)

En aquest treball l'autor analitza quins factors determinen que les llengües siguin tan diferents les unes de les altres i alhora tan complicades per als parlants no nadius. Dins d'aquest marc teòric es planteja si l'esperanto podria evolucionar cap a aquesta complexitat i quins factors fan que es mantingui en la seva simplicitat relativa, tot i aconseguir ser una llengua completa i rica.

Introducció

